Михаил Лермонтов,

## Anĝelo

*tradukita de Vasilij Devjatnin*

En mezo de nokto, en blua ĉielo,
Traflugis kaj kantis plej bela anĝelo.
Kaj nuboj kaj steloj kaj lun' en irado
Atentis kun ĝojo je l' sankta kantado.

Li kantis feliĉajn, neniam pekantajn
Spiritojn, kun Di' en ĉielo loĝantajn;
Li kantis pri Patro ĉiela kaj tera—
Kaj lia laŭdado ne estis malvera.

Animon tre junan en brakoj li tenis;
En mondo malgaja naskiĝi ĝi venis.
Kaj sono de l' kanto en juna animo
Restadis sen vort', sed kun viva estimo.

Tre longe en mondo ĝi estis premata,
Je revo mirinda pri Di' plenigata!
Kaj ŝanĝi la kanton de l' sankta sincero
Ne povis por ĝi ĉiuj kantoj de l' tero.

...

Михаил Лермонтов,

## Ангел

По небу полуночи ангел летел,
И тихую песню он пел,
И месяц, и звезды, и тучи толпой
Внимали той песне святой.

Он пел о блаженстве безгрешных духов
Под кущами райских садов,
О Боге великом он пел, и хвала
Его непритворна была.

Он душу младую в объятиях нес
Для мира печали и слез;
И звук его песни в душе молодой
Остался - без слов, но живой.

И долго на свете томилась она,
Желанием чудным полна,
И звуков небес заменить не могли
Ей скучные песни земли.

...

Михаил Лермонтов,

## La anĝelo

*tradukita de Boris Mirski*

Kun kanto solena en nokta ĉiel'
Sin portis mirinda anĝel';
Kaj luno, kaj steloj, kaj nuboj en rond'
Atentis la himnon de l' mond'.

Li kantis pri vivo sen zorga ĉagren'
Sub branĉoj de pura Eden';
Kaj laŭd' al keruboj, al granda Sinjor'
Elflugis sincere el kor'.

En brakoj animon li portis al ter',
Al mond' de malĝojo, mizer';
Kaj restis la kanto en juna anim'
Sen vorto, sen unu esprim'.

Kaj plena je stranga, mirinda dezir'
Ĝi vagis en mond' de sopir',
Kaj tedis al ĝi post la kant' de l' eter'
La veaj motivoj de l' ter'.

...

*Traduko de la Rusa poemo “Ангел” de* Михаил Лермонтов *(∗1814-10-15 – †1841-07-27) en Esperanton de* Vasilij Devjatnin *(∗1862 – †1938).*

*Arg-1039-2114 (2014-06-03 12:21:00)*

*Pri la tradukinto vidu la vikipediejon* http://eo.wikipedia.org/wiki/Vasilij_Devjatnin.

*Verkinto de tiu ĉi Rusa poemo estas* Михаил Лермонтов *(∗1814-10-15 – †1841-07-27).*

*Arg-1039-2110 (2014-06-03 12:23:12)*

*Pri la poeto Lermontov vidu la retejon* http://eo.wikipedia.org/wiki/MiДжail_Lermontov.

*Traduko de la Rusa poemo “Ангел” de* Михаил Лермонтов *(∗1814-10-15 – †1841-07-27) en Esperanton de Boris Mirski.*

*Arg-1039-2113 (2014-06-03 11:55:42)*

*Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas en* http://donh.best.vwh.net/Esperanto/iteraturo/Poezio/lermontov/angxelo.html.